

## Pasporto al la tuta mondo, lecionoj kvin-ses

### The indefinite pronoun *oni*

English has the third-person singular pronoun *one*, used when we don't want to refer to any person in particular, e.g., "One would think..." Often we use the words *they* and *you* in this same role:

**They** say that she is a good dancer.

He is so quiet that **you** don't hear him.

When **you** are rich, **you** find many friends.

Sometimes we express the same idea in English by rewording a sentence in the passive voice, often using the dummy place-holder word *it*:

The house is not inhabited. (passive)  
= **One** does not live in the house. (active)

**It** is not permitted for us to smoke. (passive)  
= **They** do not permit us to smoke. (active)

In Esperanto, all of these forms can be translated using the active voice and the pronoun **oni**:

**They** say (that) she is a good dancer.  
**Oni** diras, ke ŝi estas bona dancisto.

He is so quiet (that) **you** don't hear him.  
Li estas tiel silenta, ke **oni** ne aŭdas lin.

When **you** are rich, **you** find many friends.  
Kiam **oni** estas riĉa, **oni** trovas multajn amikojn.

The house is not inhabited.  
**Oni** ne loĝas en la domo.

**It** is not permitted for us to smoke.  
**Oni** ne permesas al ni fumi.

### **Scii / konas**

Both these verbs translate as "to know" in English, but they are more specific than their English counterparts. The verb **scii** means "to know (a fact)", while **koni** means "to know" in the sense of "to be acquainted with (something — usually a person or place)":

Mi **konas** lin, sed mi ne **scias**, kie li loĝas.  
I **know** him, but I don't **know** where he lives.

### Relative pronouns

A relative pronoun is used to begin a clause in a sentence, where it serves as a placeholder for the subject. In English, we use the relative pronouns *who(m)*, *which*, and/or *that* in phrases like:

the man **who/that** saw me  
the letter **which/that** was on the table  
the apple (**that**) I ate  
the book (**that**) I read

Note that sometimes we can leave out the relative pronoun in English. In Esperanto we often use **kiu** as the relative pronoun, and — unlike in English — we never leave it out:

la viro, **kiu** vidis min  
the man, **who/that** saw me  
  
la letero, **kiu** estis sur la tablo  
the letter **which/that** was on the table  
  
la pomo, **kiun** mi manĝis  
the apple (that) I ate  
  
la libro, **kiun** mi legis  
the book (that) I read

You may notice that relative clauses in Esperanto are often set off by commas; this isn't a rule, but it does make the sentences easier to parse.

Note that if the relative pronoun is the direct object in a clause, it takes **-n**. If it is plural, it takes **-j**:

La pomoj, **kiujn** mi manĝis, estis verdaj  
the apples (**which/that**) I ate were green

### Elliptical usage

In ordinary speech we often use incomplete sentences where some of the words are omitted. So far we've encountered a number of elliptical phrases such as:

**Bonan matenon!**  
**Bonan nokton!**  
**Saluton!**

You may have noticed something strange about some of these phrases: they have the ending **-n**. Why? It depends on what's been omitted. An elliptical phrase like "Good

evening!” really means something like:

(I wish you) a good evening!

in which “a good evening” is the direct object of a verb. Likewise, the non-elliptical Esperanto form is:

(Mi deziras al vi) bonan vesperon!

## Da

Like **de**, the preposition **da** translates to “of” in English. But **da** is used exclusively with *quantities*. It is found in answers the question “how much?” or “how many?” and is used to refer to “so much / so many” of something.

In English, we sometimes omit the “of” in quantities, but in Esperanto, **da** is always included:

Kiom **da** pomoj vi havas?

*How many apples do you have?*

(“What amount of apples do you have?”)

Kiom **da** jaroj vi havas?

*How old are you?*

(“What amount of years do you have?”)

The difference between **da** and **de** can be subtle. Consider:

Georgo havas botelon **de** vodko.

*Georgo has a bottle of vodka.*

Georgo havas botelon **da** vodko.

*Georgo has a bottleful of vodka.*

With **de**, we’re saying that Georgo has a bottle that contains vodka (or is related to vodka in some way, e.g., designed to hold vodka). With **da**, however, we’re talking about an amount: Georgo has some amount of vodka. How much? Enough to fill a bottle.

## -iĝ and transitive verbs

In the last lesson we saw the suffix **-iĝ** (“to become”) used with adjectives to make verbs:

trankvila *tranquil; calm*    trankvil**iĝu!** *calm down!*

ebria *drunk; inebriated*    ebr**iĝi** *to get drunk*

It can also be used with transitive verbs to make them intransitive:

Li rompis la vazon. La vazo romp**iĝis**.

*He broke the vase. The vase broke / was broken.*

Ŝi vekos lin. Li vek**iĝos**.

*She’ll wake him. He will wake up (become awake).*

La instruisto finas la lecionon.

*The instructor finishes/ends the lesson.*

La leciono fin**iĝas**.

*The lesson ends (becomes finished).*

## The infinitive: -i

So far we’ve seen the verb ending **-i** when talking about verbs in the abstract, as they’re listed in the dictionary: e.g. **esti, vidi, mangi**, etc.

In Esperanto, as in English, some verbs need another verb in the infinitive to complete their meaning. In English, for example, with verbs like *must, need, want*, etc., we add a second verb. We say “I must *eat*,” or “I want *to sleep*”: the second verb is in the infinitive tense. Likewise in Esperanto:

Mi povas ĵong**li**. *I can juggle.*

Mi devas dorm**i**. *I must sleep.*

Mi volas parol**i** kun vi. *I want to speak with you.*

Li ne povas kred**i** al la okuloj. *He cannot believe his eyes.*

In general, if two verbs come together, the second one will be infinitive, i.e., it will end in **-i**.

We also see prepositions used with an infinitive, like **por** (which means “for; in order to”):

Mi donis al ŝi monon **por** help**i** ŝin.

*I gave her money (in order) to help her.*

Mi iros al la vendejo **por** aĉet**i** pomsukon.

*I will go to the store (in order) to buy apple juice.*

## More correlatives (tabelvortoj)

We’ve seen the **ki-**, **ti-** and **ĉi-** words that express “all-something”, “that something” and “every-something”. Lesson 5 introduces the **neni-** words (“no-something”):

<b>nenio</b>	<i>nothing</i>
<b>neniu</b>	<i>no one/person</i>
<b>nenia</b>	<i>no kind</i>
<b>nenie</b>	<i>nowhere</i>
<b>neniel</b>	<i>in no way</i>
<b>nenial</b>	<i>for no reason</i>
<b>neniam</b>	<i>never; at no time</i>
<b>neniom</b>	<i>none (quantity); none of</i>

In lesson 6, we meet the **i-** words (“some-something”):

<b>io</b>	<i>some thing</i>
<b>iu</b>	<i>some one/person</i>
<b>ia</b>	<i>some kind; some quality</i>
<b>ie</b>	<i>somewhere</i>

<b>iel</b>	<i>somehow; in some way</i>
<b>ial</b>	<i>for some reason</i>
<b>iam</b>	<i>sometime; once</i>
<b>iom</b>	<i>some amount</i>

## Affixes

### ► -ind

The suffix **-ind** is used to denote worthiness, merit, “deserving of (something)”:

ami <i>to love</i>	am <b>inda</b> <i>loveable</i>
fari <i>to do, make</i>	far <b>inda</b> <i>worth doing</i>
viziti <i>to visit</i>	vizit <b>inda</b> <i>worth visiting</i>
kompato <i>compassion</i>	kompat <b>inda</b> <i>pitiabile, “poor”</i>

### ► -um

The suffix **-um** has no defined meaning, but is used to show some act or object related to the root. It is sometimes used to coin words for occasions where the meaning is clear, but mainly it is used with a few well-known roots. Here are some of the most common:

akvo <i>water</i>	akv <b>umi</b> <i>to water (e.g., a garden)</i>
cerbo <i>brain</i>	cerb <b>umi</b> <i>to wrack one’s brains</i>
malvarma <i>cold</i>	malvar <b>umo</b> <i>a cold, chill</i>
okulo <i>eye</i>	okul <b>umi</b> <i>to make eyes at</i>
plena <i>full</i>	plen <b>umi</b> <i>to fulfill</i>
vento <i>wind</i>	vent <b>umi</b> <i>to fan</i>

## Praktiko 5.1 “Kion oni volas?”

Se io plaĉas al iu, tiu volas fari tion. Ŝanĝu la frazojn: diru, kion oni volas aŭ ne volas. Ekzemple:

Plaĉas al Georgo suko. (trinki)  
→ Georgo volas trinki sukon.

1. Plaĉas al Georgo kongresoj. (iri)
2. Plaĉas al Ruselo Helena. (vidi)
3. Plaĉas al Karlo pilkoj. (ĵongli)
4. Malplaĉas al Flora drogaĉoj. (uzi)
5. Malplaĉas al la detektivo Ruselo. (aresti)
6. Intervjuo kun Flora plaĉas al Ken. (intervjui)
7. Malplaĉas viando al Flora kaj Karlo. (manĝi)
8. Plaĉas al Filisa akvo. (trinki)
9. Malplaĉas al Ruselo prizono. (iri)

## Praktiko 5.2: Elektu unu el tri

1. La detektivo volas (saluti / aresti / promesi) la ŝafiston.
2. La doktoro devas (ami / kuraci / ŝoki) Karlon.
3. Flora (amas / abomenas / manĝas) viandon.
4. Georgo kaj Filisa volas (paroli / kredi / aŭskulti) kun Flora.
5. Ken devas (ŝteli / trovi / aĉeti) novajn piloĵojn.
6. Karlo volis (montri / kaŝi / malfermi) la pakojn de Jolanda.
7. Flora ne povas (vivi / sveni / ŝviti) sen butikoj.
8. Karlo volas (instrui / surprizi / montri) al la doktoro kiel ĵongli.

## Praktiko 5.3: Kion ili devas fari?

Ligu demandojn 1 ĝis 11 kun la respondoj A ĝis H.

1. Atletoj devas...
2. Detektivoj devas...
3. Intervjuistoj devas...
4. Butikistoj devas...
5. Filozofoj devas...
6. Juĝistoj devas...
7. Doktoroj devas...
8. Ŝafoj devas...
9. Ŝafistoj devas...
10. Lernantoj de Esperanto devas...

**A:** ...manĝi herbon.

**B:** ...paroli kuraĝe kaj diligente studi!

**C:** ...kalkuli ŝafojn.

**Ĉ:** ...bone manĝi.

**D:** ...pensi saĝe.

**E:** ...serĉi malbonulojn.

**F:** ...vendi varojn sukcese.

**G:** ...decidi saĝe.

**Ĝ:** ...kuraci homojn.

**H:** ...lerte demandi.

**Praktiko 5.4:**

Ligu demandojn 1 ĝis 9 kun la respondoj A ĝis G.

1. Kial Flora estis kompatinda?
2. Kial Georgo estas kompatinda?
3. Kial Ruselo estas kompatinda?
4. Kial Filisa estas kompatinda?
5. Kial Flora ŝoforas senpermeso?
6. Kial Georgo prenis monon el la te-kruĉo?
7. Kial la detektivo venis?
8. Kial Kenĝi portis glason?

- A:** Ĉar Karlo telefonis al la polico.  
**B:** Ĉar ŝia edzo ne rekonas ŝin.  
**C:** Ĉar sinjorino ne trinkas el botelo.  
**Ĉ:** Ĉar ŝi ne havas monon por permesilo.  
**D:** Ĉar la detektivo serĉas lin.  
**E:** Ĉar ŝi havis multajn fakturojn.  
**F:** Ĉar li sen-scie trinkis botelon da vodko.  
**G:** Por doni ĝin al s-ino Bundo.

**Praktiko 5.5:**

Aldonu la ĝustajn sufiksojn:

**-ind, -ebl, -iĝ, -ej, -ul, -aĉ, -ist**

1. Georgo drinkis botelon da vodko kaj li ebri \_\_\_\_\_is.
2. Jes, kompren \_\_\_\_\_e mi povas aŭdi vin; mi ne estas surd \_\_\_\_\_o!
3. “Mi vidas en mia juĝ \_\_\_\_\_o tiujn, kiuj uzas drog \_\_\_\_\_ojn.”
4. Ho, via kapo doloras vin? Kompat \_\_\_\_\_a Georgo!
5. Kion vi diras? “Du kaj du estas kvin?” Ne \_\_\_\_\_e!
6. Alia vorto por doktoro estas kurac \_\_\_\_\_o.
7. Doktoroj laboras en malsan \_\_\_\_\_oj.
8. Valoras savi la vendejon. La vendejo estas sav \_\_\_\_\_a.
9. Ni povas savi la vendejon. La vendejo estas sav \_\_\_\_\_a.
10. La vetero estas malbona. Ĝi \_\_\_\_\_as.
11. La detektivo ne povas literumi simplajn nomojn. Li estas stult \_\_\_\_\_o.

**Praktiko 5.6:** Elektu la ĝustajn tabelvortojn. (*iu, kiu, ĉiu, neniu, kiel, tiel, kie, tie, ĉie, kial, kiam, kioma, kio, kion*)

1. “Ĉu vi estas surdaj? \_\_\_\_\_ sonoras ĉe la pordo, sed \_\_\_\_\_ iras kaj malfermas ĝin!”
2. “Mia stomako graŭlas \_\_\_\_\_ vulkano.”
3. “Ho, \_\_\_\_\_ estas mia pakaĵo? Ha, \_\_\_\_\_ ĝi estas!”
4. “Tiu virino kisas min! \_\_\_\_\_ ŝi kisas min? Mi ne scias.”
5. “Sinjorino! \_\_\_\_\_ vi faraĉas? Ne batu la ŝafiston!”
6. “Kaj nun li ne scias, \_\_\_\_\_ li estas, \_\_\_\_\_ li estas aŭ \_\_\_\_\_ li estas.”
7. “\_\_\_\_\_ horo estas? Jam la dekunua tridek kvin?”
8. “Mia edzo ne scias, \_\_\_\_\_ li estas. Mia filo ne scias, \_\_\_\_\_ li portas. \_\_\_\_\_ mi estas? En idiotejo?”
9. “Mi surmetos la okulvitrojn kaj \_\_\_\_\_ scios, \_\_\_\_\_ mi estas.”
10. “Sinjorino Flora, mi serĉis vin \_\_\_\_\_, en la parko, en la urbo. \_\_\_\_\_ vi forkuris, mi kuris post vi.”
11. “Jolanda, Karlo, Helena, Filisa! \_\_\_\_\_ estas hejme! \_\_\_\_\_ vi ne laboras? \_\_\_\_\_ estas en informejo!”
12. “Ho, stomako, ne \_\_\_\_\_ grumblu!”

**Praktiko 5.7: Trankviliĝu!** (Faru vortojn kun la sufikso -iĝ):

1. Flora ne estas *trankvila*. “\_\_\_\_\_!” kriis Ken.
2. Georgo drinkis vodkon. Nun li estas *ebria*. Li \_\_\_\_\_.
3. La glaso ne estas *plena*. Filisa verŝas akvon. La glaso \_\_\_\_\_.
4. Karlo komence kuris malrapide. Nun li kuras *rapide*. Li \_\_\_\_\_.
5. Komence, Georgo ne estis *laca*. Nun li estas *laca*. Li \_\_\_\_\_.
6. Georgo *rompis* la vazon de Flora. Ŝia vazo \_\_\_\_\_.
7. Helena ne estas *fama* skulptisto. Sed eble ŝi \_\_\_\_\_.
8. Ruselo estas *malsata*. Se li multe manĝos, li \_\_\_\_\_.
9. Georgo estas sana. Nun li estas *malsana*. Li \_\_\_\_\_.
10. Oni *interrompis* la intervjuon. La intervjuo \_\_\_\_\_.
11. La instruisto *komencis* la lecionon je la 7-a horo. Tiam la leciono \_\_\_\_\_.